

ILEI raportas

2015-01-15

Raportas la prezidanto pri trimonata agado 2014-10-15 ĝis 2015-01-15

Revuoj

IPR *Internacia Pedagogia Revuo* plu aperas sub la gvido de Jozefo Nemeth, ekde 1994. Pro tio ni dediĉis la lastan numeron de 2014 al li. Nova rubriko aperas: ILEI-UNESKO, por flegi la kontaktojn, konigi Unesko-n al niaj membroj, stimuli la kontaktojn kun Unesko en la unuopaj landoj.

JA *Juna Amiko* aperos kvarfoje dum 2015 laŭ decido de la Komitato de ILEI en julio 2014. Ni preparas tion. Stano Marcek bonege laboras.

48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos de la 17-a ĝis la 25-a de julio en **Oostende**, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Agema loka grupo eklaboris kuraĝe kaj efike kunlabore kun nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petroviĉ. Okazos simpozio kaj lingva festivalo. Akceptita konferenca temo estas: *Grandan pacon post la grandaj militoj*. Kiel novaĵo en la konferenca programo estas proponataj kursoj por komencantoj.

Venontaj Konferencoj

Radojica Petrovic verkis demandaron kaj organizis konkurson por ebligi al ĉiuj sekcioj aŭ aliaj asocioj kandidatigi por inviti nian venontan Konferencon, la 49an, en la jaro 2016. La demandaro kaj konkurso kondiĉoj estis vaste diskonigitaj kaj estos simile aplikataj por venontaj konferencoj post 2016.

Rezulto: **Nyíregyháza** (HU) gastigos nian 49an Konferencon en 2016 post UK en Nitra (SK). Pro tre taŭga kaj alloga invito el Kroatio ni proponis al la kroataj kandidatoj organizi tuj poste en **Bjelovar** la unuan ILEI-festivalon de Esperantaj kulturo kaj pedagogio, kun ebla titolo *PAFO : Pedagogia Avangarda Festivalo*. Ili konsentis prikonsideri la proponon kaj decidis pri ĝi en sia kunsido la 17-an de januaro.

Vivo de la Ligo

Membroprizorgado iris al Sebastian Cyprych (Pollando) laŭ decido de la estraro, por malŝarĝi Magdalena Fejficova, kiu malsanas. Li estis nomumita "komisiito" pri membroprizorgado.

Invito. Por prepari la 47-an Konferencon en Montevideo ĉefe laboris Sinjorino Sonia RISSO. La ILEI estraro decidis inviti ŝin al Eŭropo en 2015. Ŝi alvenos por helpi dum la Tria Tutmonda Kolokvo (TTK), iros poste al Bretonio (Francio) por prelegi kaj partoprenos la ILEI-Konferencon en Oostende kaj UK-n en Lille helpante al ILEI.

6 estraraj voĉdonoj retaj okazis.

La 15-an de novembro 2014 okazis **skajpa estrarkunsido** kun 6 estraranoj. La estraro konfirmis 14 retajn decidojn faritajn inter aŭgusto 2013 kaj la fino de 2013. La estraro konfirmis 11 retajn decidojn faritajn inter la unua de januaro 2014 kaj la 15-a de novembro 2014.

Mi sendis **salutmesaĝojn** al 3 organizantoj de eventoj, kursoj, kongresoj.

En Montevideo elektiĝis nova **Elekta Komisiono**, ĉar 2015 estos por la estraro elektojaro. Elektiĝis Jennifer Bishop, Aurora Bute kaj Ana Montesinos de Gomis. En septembro Jennifer demisiis pro sanproblemoj. Ni trovis kunlaboreman komitataninon Monique Arnaud. Ni malkovris en la Elekta Regularo, ke tiu Elekta Komisiono devas konsisti el komitatanoj. Pro tio ni devis danki kaj maldungi Ana Montesinos de Gomis. Post esploroj en diversaj landoj ni trovis Synnöve Myntinen en Finnlando, ŝi konsentis kandidatiĝi. Per reta voĉdono la Komitato aprobis la konsiston de tiu nova Elekta Komisiono: Aurora Bute, Monique Arnaud kaj Synnöve Mytinen, en la 8^a de dec 2014. Ni esperu, ke ili sukcesos arigi kunlaboremajn estraranojn por la elektoj de julio 2015 en Oostende, Belgio.

Niaj **sekcioj** havas sian vivon laŭ malsamaj stiloj. Kelkaj floras, kreskas kaj agadas, organizas sian kongreson, seminarion aŭ similan eventon. Kelkaj sekcioj dormetas, diversaj faktoroj intervenas en tio. Ni provas sekvi la agadojn, konsili, se peto pri konsilo venas, skui, se vekado endas. Daŭre ni provas kolekti la statuton de ĉiu sekcio en elektronika formo; ne ĉiuj ankoraŭ sendis tiun dokumenton. La raportoj, kiuj estas devo por sekciestroj kaj reprezentantoj, devas baldaŭ atingi nin; tra ili, per ili, ni scios pri la vivo de niaj sekcioj kaj povos argumenti pri niaj diversaj agadoj en kontakto kun ekstermovadaj institucioj.

Okazas internaciaj kunvenoj kiel la 4-a ISOA en Kameoka, Japanio, tre brila evento kun partoprenantoj el Koreio, Ĉinio kaj Japanio. La okazigo de KER-ekzamenoj sukcesis en kunlaboro kun loka ILEI-sekcio en kelkaj lokoj.

Novaj sekcioj: ni lanĉis la ideon pripensi pri kreado de ILEI-sekcio al 5 regionoj de la mondo, kiuj havas 5 membrojn aŭ pli: Armenio, Britio, Indonezio, Slovakio, Urugvajo. Ni baldaŭ scios pri iuj paŝoj.

Niaj **estraranoj** havas altan postenon en sia landa movado kaj aktivas tie paralele kun sia laboro por la Ligo. Konsekvence ili abunde aktivas.

Kandidato por **Honora Membreco** aperis subite kaj kun giganta subteno: nia vic-prezidanto Zsófia Kóródy, kiu raportis pri sia agado en interkultura kampo kadre de kontaktoj en la partnereco Herzberg (DE) kaj Gora (PL). El dek sekcioj venis subteno. Mi skribis por peti laŭstatutan skriban proponon. Kaze ke tri sekcioj konkretigos tiun proponon, la elekto okazos dum la Konferenco en julio 2015.

Retejoj

www.ilei.info funkcias. Ĝi estas nia enmovada vektoro. Ni kreis en la paĝo "Dokumentoj" rubrikon pri Unesko kun diversaj tekstoj kaj informoj. Ni kreis en la sama paĝo rubrikon "Interkulturo" kun diversaj dokumentoj kaj retligoj.

Pri www.ilei-mondo.info estas nun laboranta fakulo. Unue la plurlingva retejo restos la sama, kun reta tre detala aliĝilo por la TTK (Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto). Pli poste venos reordigado pli moderna kaj facila por la uzantoj. Kompreneble la aliĝilo paralele ekzistos por nia ĉiujara Konferenco en julio en Oostende, BE.

Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto (TTK), 13-an ĝis 16-an de majo 2015 en Svislando

Ni komencis traduki al Eo bazajn priskribojn de diversaj muzeoj en la regiono. Tio estas pozitiva kromefiko de la Kolokvo.

Du instancoj svisaj decidis subteni la eventon per sume 4500 CHF.

La programo estas en prilaboro. La eblaj prelegontoj ricevis detalan priskribon de la organiza aspekto de tiu evento. Iom post iom ili anoncas sin.

La reta aliĝilo pretas.

Honora Komitato konsistiĝas iom post iom. Nuntempe 18 personoj membras en ĝi; inter ili 7 diplomatoj.

Kontaktoj kun movadaj asocioj

ILEI decidis subteni la agadon de HORI Jasuo "Esperanto-Sumoo". Aperis voko en nia retejo kaj en nia revuo. Legi ligas al nia kulturo kaj lertigas la leganton.

Kontaktoj kun **UEA kaj TEJO** estas oftaj. Pro mia partopreno en AMO 7 mi rilatas ofte kun la vic-prezidanto de UEA Stefan MacGill. Pro lia vojaĝo al Tanzanio kaj Burundo mi rilatas ofte kun la prezidanto de TEJO Lukas Zebrowski. Miaj prezentoj pri UN, Unesko, Eŭropo kaj la movada strukturo iros al retejo de TEJO por aktivula maturigo.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

UNESKO

Nova rubriko aperas en IPR: ILEI-UNESKO, por flegi la kontaktojn, konigi Unesko-n al niaj membroj, stimuli la kontaktojn en la unuopaj landoj. Rubriko pri Unesko ekaperas en nia retejo ilei.info en la paĝo "Dokumentoj". Flegi la kontakton kun Unesko estas decido de nia Komitato en Montevideo.

Mi partoprenis en la seminario **AMO7** en Lomeo, Togolando. Mi prelegis pri UN, Unesko kaj nia movado. Fama togolanda esperantisto Sinjoro Afantchao estas prezidanto de la federacio de togolandaj lernejoj asociigitaj al Unesko. Li konceptis atestilon pri tiu seminario AMO7, kiu kongruas precize kun la celoj de Unesko.

Projekto **por virinoj** en Benino. Ĝi okazos en januaro en Kotonuo danke al malavara donaco de tri personoj en nia movado. Staĝo tutsemajna kun partopreno de dek virinoj eblos. Eo matene (mi instruos), posttagmeze instruos fakulo pri loka lingvo fonua kaj ĝia skriba formo,

kaj virina kapabligho kaj kuraĝigo (fr: capacitation, leadership féminin; en: empowerment, women leadership), tio plej trafe kongruas kun la postuloj kaj celoj de Unesko.

Tiuj du projektoj estas “loka agado” (fr: travail de terrain; en: grassroots actions). Tio valore kompletigas la informojn en IPR kaj en la retejo en niaj naskiĝontaj rilatoj kun Unesko.

Agadoj

Premio Mauro La Torre

Laŭ propono de la familio La Torre prezentiĝas eblo por fakuloj, esploristoj, kandidatiĝi pri tiu premio. La organizantoj estas la familio La Torre kaj ILEI. La estraro de ILEI diskutis pri regularo kaj voĉdonis. Nun la dokumento aperas sur nia retejo kaj anonco aperis en la revuo ESPERANTO en paĝo 211 de la numero de oktobro. Detala priskribo aperis en novembro.

“Ni Savu Niajn Semojn”.

Mirejo kontaktis Roland Rotsaert en Belgio, kiu zorgas pri bibliotekaj aferoj. Ni planas demandaron por kolekti precizajn sciojn pri niaj bibliotekoj tra la mondo. La projekto “**Ni Savu Niajn Semojn**” estis prezentita dum Konferenco KAEST en Modra, Slovakio.

Fotokonkurso “**Fotu nekutime!**” Por variigi la fotojn de la diversaj kursoj kaj kunvenoj ILEI lanĉis fotokonkurson. Ni ricevis dek fotojn. Ĵurio el HUANG Yinbao “Trezoro” kaj Brian MOON deĵoris kaj decidis pri premioj. La premiita foto aperis en IPR 2014 4.

Nova projekto: Ĉinio: instruado de Eo al specialaj infanoj. Sinjorino YU, kiu partoprenis la Konferencon en Montevideo, proponis lanĉi ion tian. Ni atendas pliajn detalojn pri tiuj infanoj. Temas pri embrio de nova projekto.

Mirejo esperantisto de la Jaro, pro 5 agadoj, inter aliaj 3 rilatas al ILEI

1. Gvidado de la Ligo
2. Estrado de la 47^a Konferenco en Montevideo en julio 2014
3. Lanĉo de la Tria Tutmonda Kolokvo por majo 2015 (TTK)

Konsekvence la vivo de la Ligo gravas al ĉiuj.

Farendaĵoj

Sciu, ke mia listo kun farendaĵoj estas same longa kiel tiu ĉi raporto. Daŭre la ĉiutaga mastrumado de la laboro por la vivo de la Ligo forrabas ĉiujn miajn horojn kaj iu trankvila rigardo al foraj celoj maloftas.

2015-01-15
Mireille Grosjean
Prez. de ILEI

Kotonuo, Benino